Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

GE FA
STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH

Numero 1 Januaro - Marto 2020

Kolego urĝe serĉata! Kollege dringend gesucht!



Lokomotivkondukisto salutas sian kolegon
(Foto: DB Mediathek, vd. paĝon 3)

Ein Lokführer grüßt seinen Kollegen
(Foto: DB Mediathek, s. Seite 3)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Kolego urĝe serĉata	3	Kollege dringend gesucht	3
Ŝarko sendenta	5	Zahnloser Hai	5
Bonvenon en *Słubfurt*	7	Witamy in Słubfurt	7
Fritz Lautenbach	9	Fritz Lautenbach	9
Mia penso	11	Meine Gedanken	11
Alvoko KER-ekzamenoj	12	Aufruf GER-Prüfungen	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

kiu regule studas la gazetojn eventuale memoras pri la disputo inter la lando Bremen kaj la germana futbal-ligo pri la kostoj de polica sekurigo kadre de riskaj maĉoj. La federacia administracia juĝejo decidis ke la kostoj parte povas esti fakturataj al la aranĝantaj kluboj. Tio ĝis nun validas nur por Bremen kaj ne estas klare ĉu la konstitucia juĝejo samopinios. Nun tiuj maĉoj estas komercaj aranĝoj de entreprenoj kiuj sensukrupule pagas milionojn por aĉeti siajn sportsoldulojn. Do kontribuo al la sekuriga organizado estas postulebla afero.

Se la ŝtelromp-averta instalaĵo misfunkcias kaj vokas la policon, la posedanto pagas la kostojn. Bone, por vartado respondecas la posedanto.

De la kaŭzinto de akcidento la polico postulas punpagon, se ĝi venas kaj protokolas la okazaĵon.

Nun publikiĝis kotiztabelo de la federacia polico, enkondukita jam en pasinta Oktobro, do ne plu tute freŝa sed nur nun atentita pro konkreta okazaĵo. Temas pri la trovo de forgesita kofro en la stacidomo de Düsseldorf kaj la sekvo de tiu trovo, la decido de danĝersituacio.

Konforme al la nova kotiztabelo la federacia polico fakturis la kostojn por baro, trejnita hundo, malfermo, kontrolo de la kofro, protokolo ktp. – entute 550 Eŭroj.

Laŭ la volo de la ministerio – mi citas la agentejon dpa - tio havu ankaŭ timigan efikon.

Dum la pasintaj monatoj estis multe parolate pri la malkreskanta respekto kontraŭ ŝtataj organoj specife la polico kaj la rimedoj necesaj por regajni ties aŭtoritaton.

Ni atendu la aplikon de tiu kotiza regularo en praktiko, sed mi dubas pri la ĝusta respektlevanta efiko, se pasaĝeroj en fervoja

Liebe Leserinnen und Leser,

wer regelmäßig die Zeitungen studiert, wird sich eventuell an den Streit zwischen dem Land Bremen und der Deutschen Fußball-Liga erinnern, um die Kosten der Polizeiabsicherung im Rahmen von Risikospielen. Das Bundesverwaltungsgericht hat beschlossen, dass die Kosten zum Teil den veranstaltenden Clubs in Rechnung gestellt werden können. Das gilt bisher nur für Bremen, und es ist nicht klar, ob das Bundesverfassungsgericht der gleichen Auffassung ist. Nun sind diese Spiele kommerzielle Veranstaltungen von Unternehmen, die ohne Skrupel Millionen zahlen, um dafür ihre Sportsöldner zu kaufen. Ein Beitrag zur Organisation der Sicherheit ist eine Sache, die man verlangen kann.

Wenn eine Einbruchsmeldeanlage gestört ist und die Polizei ruft, trägt der Besitzer die Kosten. Gut, für die Wartung ist der Besitzer verantwortlich.

Vom Verursacher eines Unfalls verlangt die Polizei ein Bußgeld, wenn sie kommt und das Geschehene zu Protokoll nimmt.

Jetzt ist eine Gebührenordnung der Bundespolizei bekannt geworden, die schon im vergangenen Oktober eingeführt wurde, also nicht mehr ganz frisch ist, die aber wegen eines konkreten Vorfalls erst jetzt Beachtung findet. Es geht um das Auffinden eines vergessenen Koffers im Bahnhofsgebäude Düsseldorf und dessen Folge, dem Beschluss einer Gefahrenlage. Entsprechend der neuen Gebührenordnung stellte die Bundespolizei die Kosten in Rechnung für die Absperrung, den trainierten Hund, Öffnung und Kontrolle des Koffers, Protokoll usw. – insgesamt 550 Euro.

Nach dem Willen des Ministeriums – ich zitiere die Agentur dpa – soll dies auch eine abschreckende Wirkung haben.

In den vergangenen Monaten wurde viel über den abnehmenden Respekt gegenüber staatlichen Organen, besonders der Polizei gesprochen und die Mittel, um ihre Autorität zurückzugewinnen.

stacio devas atenti ĉu ilia konduto ne povas veki la impreson de danĝero. Ĉu vole aŭ nevole: Ili riskas ke venos fakturo.
Do vojaĝante per fervojo ne nur pensu pri ŝtelistoj sed ankaŭ pri la polico kaj ne lasu vian kofron senatenta!

Kun ambivalenca sento salutas



Guido Brandenburg

Lasst uns die Anwendung dieser Gebührenordnung in der Praxis abwarten, aber ich bezweifle die richtige respektfördernde Wirkung, wenn Reisende in einem Bahnhof darauf achtgeben müssen, ob ihr Verhalten nicht den Eindruck einer Gefahr erwecken könnte. Ob gewollt oder nicht gewollt: Sie riskieren eine Rechnung zu bekommen.
Wenn ihr also mit der Bahn fahrt, denkt nicht nur an Diebe, sondern auch an die Polizei und lasst euren Koffern nicht unbeaufsichtigt.

Mit durchwachsenem Gefühl grüßt

Guido Brandenburg



Trejnado en lokomitiva simulilo (Foto: DBAG, Vertrieb) / Training im Loksimulator (Foto: DBAG, Vetrieb)

Kolego urĝe serĉata!

La merkato estas malplena, la konkurenco pri junaj teknike interesitaj kunlaborantoj enorma. Demografio kaj personara planado ne staranta ekster ĉiu kritiko, zorgis por drama deficito. Sole en Nordrejn-Vestfalio mankas 700 lokomotivkondukistoj.
Nun la dek plej grandaj reltransportaj entreprenoj startis komunan kampanjon titolitan „Fokuso Fervojo *NRW*“ kaj sondas inter alie inter rifuĝintoj. La Germana Fervojo en tiu cel-

Kollege dringend gesucht!

Der Markt ist leer, die Konkurrenz um junge, technisch interessierte Mitarbeiter enorm. Demografie und eine Personalplanung, die nicht über jede Kritik erhaben ist, haben für ein dramatisches Defizit gesorgt. Allein in Nordrhein-Westfalen fehlen 700 Lokomotivführer. Jetzt haben die zehn größten Eisenbahn-Transportunternehmen unter dem Titel „Fokus Eisenbahn NRW“ eine gemeinsame Kampagne gestartet und sondieren unter

grupo serĉis ĝis nun prioritate resursojn por transpreno de teknikaj taskoj en vartado kaj riparo de aparatoj kaj en trako-konstruo.
La fondaĵo Klerigo kaj Metio instalis kurson por aliprofesiuloj el Sirio kaj aliaj araba-lingvaj landoj. La komenca lingvokurso certe estas la plej granda defio. Ja ne temas nur pri regado de la germana lingvo sed pri la abundo de nocioj en la fervoja faklingvo, kiujn necesas ne nur proksimume sed precize kompreni kaj apliki.
La sin anoncintaj kandidatoj majoritate jam plurajn jarojn vivas en Germanio sed pro manko de atestiloj aŭ pro tro specifa profesio ne havas ŝancojn pri konvena okupo kaj dependas de perantoj por malaltkvalifikuloj. Agrikulturisto sen spertoj el meza Eŭropo havas same malbonajn pozicion kiel studinto de araba literaturo.
En oksemajna preparsesio ili nun lernas fakterminojn kaj refreŝigas siajn konojn en matematiko, tekniko kaj natursciencoj. Helpon kaj akompanon ili ricevas de trejnistoj kaj socipedagogoj. Kiu trapasas medicinan-psikologian teston pri vid- kaj aŭdkapablo, kapabloj koncentriĝi, memori, rapide reagi ankaŭ en stresa situacio, tiu rajtas komenci la kurson.
Post du jaroj, sukcesaj kurso-sekcioj kaj ekzamenoj la premio estas sekura laborloko kun kompare bona salajro.
Iniciatoj tiaspecaj ne nur helpas kontentigi la bezonojn de la fervojtrafikaj entreprenoj, sed estas gravaj paŝoj al integrado de rifuĝintoj.



anderem unter Geflüchteten. Die Deutsche Bahn hat bisher in dieser Zielgruppe vordringlich nach Ressourcen für die Übernahme technischer Aufgaben in der Wartung und Reparatur von Geräten und im Gleisbau gesucht.
Die Stiftung Bildung und Handwerk hat einen Kurs für Berufsfremde aus Syrien und anderen arabisch-sprachigen Ländern eingerichtet.
Der anfängliche Sprachkurs ist sicher die größte Herausforderung. Es geht ja nicht nur um die Beherrschung der deutschen Sprache, sondern um die Vielzahl von Begriffen aus der Eisenbahnfachsprache, die nicht nur ungefähr sondern präzise verstanden und angewandt werden müssen.
Die Kandidaten, die sich gemeldet haben, leben mehrheitlich schon einige Jahre in Deutschland, hatten aber wegen fehlender Zeugnisse oder wegen eines zu spezifischen Berufs keine Chance auf eine angemessene Beschäftigung und sind abhängig von Jobvermittlern für Geringqualifizierte. Ein Landwirt ohne Kenntnisse in Mitteleuropa hat eine ebenso schlechte Position wie ein Absolvent über arabische Literatur.
In einem achtwöchigen Vorbereitungskurs lernen sie jetzt Fachtermini und frischen ihre Kenntnisse in Mathematik, Technik und Naturwissenschaften auf. Hilfe und Begleitung bekommen sie von Trainern und Sozialpädagogen. Wer den medizinisch-psychologischen Test abschließt, zum Seh- und Hörvermögen, zu Konzentrations- und Merkfähigkeit und der Fähigkeit auch in einer Stress-Situation schnell reagieren zu können, der darf die Ausbildung beginnen.
Nach zwei Jahren, erfolgreichen Kursabschnitten und Prüfungen ist die Prämie ein sicherer Arbeitsplatz mit vergleichsweise guter Bezahlung.
Derartige Initiativen helfen nicht nur die Bedürfnisse der Eisenbahnverkehrsunternehmen zu befriedigen, sondern sind auch wichtige Schritte zur Integration Geflüchteter.

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**



Pesa Link atendas ekveturon en Winterberg / Ein Pesa Link wartet auf die Abfahrt in Winterberg
(Foto: Fantaglobe, WikiMedia)

Ŝarko sendenta

La Germana Fervojo ne ĉiam estas bonŝanca rilate siajn liverantojn. La livero prokrastiĝas, difektoj estas riparendaj, la kvalito ne estas sufiĉa, la veturkontrola sistemo ĉe ICE 3 ne fidinde funkcias, troviĝas malbonaj veldojuntoj ĉe ICE 4, la direkta programaro de duetaĝa IC 2 estas malstabila, la bremsiloj ĉe la kliniĝteknika motorvagono 412 ne efikas sufiĉe, klimatizaj sistemoj rifuzas sian servon, pordoj, necesejoj …

Sed ne nur germanaj liverantoj respektive produktantoj kaŭzas problemojn. Montriĝas ke tion same povas la eksterlanda konkurenco.

470 dizelajn motorvagonojn de la speco Pesa Link - pro la danĝera aspekto ankaŭ nomataj „*Regio Shark*“ (regiona ŝarko) - la Germana Fervojo en la jaro 2012 intencis aĉeti de la pola firmao el Bydgoszcz. Temis pri komisio por 1,2 miliardoj da eŭroj.

La akiro de funkcipermeso daŭris ĝis Julio 2018, ĉar la vagonoj komence estis kelkajn milimetrojn tro larĝaj. Por trafiko en *Sauer-*

Zahnloser Hai

Die Deutsche Bahn hat nicht immer Glück mit ihren Zulieferern. Die Auslieferung verzögert sich, Schäden sind zu reparieren, die Qualität reicht nicht aus, das Steuerungssystem des ICE 3 funktioniert unzuverlässig, im ICE 4 finden sich schlechte Schweißnähte, auch die Steuerung des doppelstöckigen IC 2 ist instabil, beim Neigetechnik-Triebwagen 412 reicht die Bremskraft nicht aus, Klimaanlagen verweigern ihren Dienst, Türen, Toiletten …

Aber nicht nur deutsche Lieferanten bzw. Hersteller verursachen Probleme. Es zeigt sich, dass die ausländische Konkurrenz das ebenso kann.

470 Dieseltriebwagen der Bauart Pesa Link - wegen des gefährlichen Aussehens auch „Regio Shark“ genannt - wollte im Jahr 2012 die Deutsche Bahn bei der polnischen Firma aus Bydgoszcz kaufen. Es handelte sich um einen Auftrag für 1,2 Milliarden Euro.

Der Erhalt der Betriebserlaubnis brauchte bis Juli 2018, weil die Wagen einige Millimeter zu

land-reto ankaŭ la DB Regio ricevis 16 trisekciajn motorvagonarojn. Celo estis anstataŭigi la pezajn kaj malrapidajn antaŭulojn el la serio 624/628.

Tre baldaŭ aŭdiĝis protestoj de la apudliniaj loĝantoj, kiuj plendis ke la bruo de la bremsantaj veturiloj estas komparebla kun tiu de startanta aviadilo. Atentigo ke pli granda rapideco signifas pli da ŝarĝo por la motoro kaj tial almenaŭ saman bruon kiel ĉe la malnovaj veturiloj ne vere helpis. Ankaŭ la argumento per bruizolo internen ne povis konvinki la najbarojn loĝantajn ekstere. Kaj mezuroj rapide evidentigis brunivelon de 90 dB kvankam kontraktita kun la liverinto estis maksimumo de 83 dB. La ventumiloj de motoro, elektrodinamikaj bremsiloj kaj klimatiza sistemo estas evidente tro laŭtaj. Ankaŭ la veturo tra kurboj – oni supozas pro la fiksa interligo de la samaksaj radoj – estas pli laŭta ol ĉe aliaj veturiloj.



Kuplado zorgas por ripeta ĉagreno
Kuppeln sorgt für wiederholten Ärger
(Foto: Clic, WikiMedia)

Aldonajn malfacilaĵojn kaŭzas la funkcia programaro, kiu okaze haltigas trajnojn surlinie, malebligas kupladon, postulas veturojn kun duona longo kaj eksterplanajn riparajn paŭzojn. Aktuale DB Regio plue uzas malnovajn veturilojn kaj disputas kun la konstruinto. Kontentiga rezulto ne jam estas videbla. De la antaŭviditaj 470 motorvagonoj la Germana Fervojo ĝis nun nur aĉetis 73. Privataj trafikentreprenoj jam nuligis siajn kontraktojn kaj mendis ĉe la konkuranto Alstom.

Pesa depost Junio 2018 estas posedaĵo de la pola ŝtata evoluiga fonduso.

Guido Brandenburg

breit waren. Für den Verkehr im Sauerland-Netz bekam auch DB Regio 16 dreiteilige Triebwagen-Züge. Ziel war, die schweren und langsamen Vorgänger aus der Baureihe 624/628 zu ersetzen.

Sehr bald gab es Proteste der Streckenanwohner, die sich beschwerten, der Lärm der bremsenden Fahrzeuge sei mit dem eines startenden Flugzeug vergleichbar. Der Hinweis, dass eine höhere Geschwindigkeit auch eine größere Belastung für den Motor bedeute und damit wenigstens den gleichen Lärm wie bei den alten Fahrzeugen, half nicht wirklich. Auch das Argument einer verbesserten Dämmung des Innenraums konnten die draußen wohnenden Nachbarn nicht überzeugen. Und Messungen offenbarten schnell eine Schallemission von 90 dB, obwohl mit dem Lieferanten ein Maximum von 83 dB vereinbart war. Die Lüfter von Motor, elektrodynamischen Bremsen und Klimaanlage sind offensichtlich zu laut. Auch die Kurvenfahrt – man vermutet wegen der festen Verbindung der Räder einer Achse - ist lauter als bei anderen Fahrzeugen.

Zusätzliche Schwierigkeiten verursacht die Betriebssoftware, die gelegentlich die Züge auf freier Strecke zum Halten bringt, das Kuppeln verhindert, Fahrten mit halber Länge nach sich zieht und außerplanmäßige Werkstattaufenthalte.

Gegenwärtig nutzt DB Regio weiter alte Fahrzeuge und streitet sich mit dem Hersteller. Ein befriedigendes Ergebnis ist noch nicht in Sicht. Von den vorgesehenen 470 Triebwagen hat die Deutsche Bahn bis jetzt nur 73 gekauft. Private Verkehrsunternehmen haben ihre Verträge bereits anulliert und bei dem Konkurrenten Alstom bestellt.

Pesa ist seit Juni 2018 im Besitz des polnischen staatlichen Entwicklungsfonds.

RESENDO

(trad. Brandenburg)



(Foto: Bodo Ehrlich)

Bonvenon en *Słubfurt*!

„Tre estimataj gesinjoroj, koran bonvenon en *Słubfurt*, urbo kiu troviĝas sur la germana kaj la pola flankoj *(de la Odro)*.“
Tiel Michael Kurzwelly kutimas saluti sian gastojn, kiujn li gvidas tra *Słubfurt*, la ĉefurbo de la lando *Nowa Amerika*. *Nowa Amerika* estas relative malgranda kaj ĝiaj limoj ne klare difinitaj. Fakte ili moviĝas depende de siaj civitanoj, respektive de ties konvinko. Okaze ĝi etendiĝas de Berlin ĝis Poznan. *Nowa Amerika* havas parlamenton, konstitucion kaj himnon kaj almenaŭ unu ambasadon.
Kurzwelly iniciatis la fondon de tiu kreaĵo la 20-an de Marto 2010. Facile konkludeble li estas artisto kaj *Nowa Amerika* same kiel *Słubfurt* arteksperimento, kies kunagantoj - poloj el *Słubice* same kiel germanoj el Frankfurt - decidis ignori la ŝtatlimon kaj difini novan landon kies civitanoj ili volas esti. La limon markas monumen toj kaj artinstalaĵoj aperantaj kaj malaperantaj. Ĝi tial ne estas fiksa linio.

Witamy in Słubfurt!

„Szanowni Damen und Panowie, herzlich witamy in Słubfurt, einer Stadt, które liegt auf polskiej und deutscher stronie.“
So pflegt Michael Kurzwelly seine Gäste zu begrüßen, die er durch Słubfurt führt, die Hauptstadt des Landes Nowa Amerika. Nowa Amerika ist verhältnismäßig klein und seine Grenzen nicht klar definiert. Tatsächlich bewegen sie sich mit seinen Bewohnern, bzw. deren Überzeugung. Gelegentlich erstreckt es sich von Berlin bis Poznan. Nowa Amerika hat ein Parlament, eine Verfassung und eine Hymne und wenigstens eine Botschaft. Kurzwelly hat am 20. März 2010 die Gründung dieses Gebildes initiiert. Der Schluss liegt nahe, dass er Künstler ist und Nowa Amerika ebenso wie Słubfurt ein Kunst-Experiment, dessen Mitwirkende – Polen aus Słubice ebenso wie Deutsche aus Frankfurt – beschlossen haben, die Staatsgrenze zu ignorieren und ein neues Land zu definieren, dessen Bürger sie sein wollen.



La Ponta Placo estas loko por organizitaj kaj spontaneaj aranĝoj – ankaŭ de la asocio Słubfurt r.A.
Der Brückenplatz ist ein Ort für organisierte und spontane Veranstaltungen – auch des Vereins Słubfurt e.V.
(Foto: Bodo Ehrlich)

Tirante la anarkie petolan kovraĵon de tiu projekto oni ekkonas ties seriozan intencon. Ŝtatlimo estas arbitre desegnita linio, kiu ne kapablu disigi najbare loĝantajn homojn. Kontraŭ senlace flegataj stereotipoj kaj antaŭjuĝoj efikas nur propraj kaj komunaj spertoj.

La *Nowa-Amerik*-anoj kuiras dum reciprokaj vizitoj (devizo „Bonan apetiton – *Smacznego*“), okazigas olimpikajn ludojn kun sportoj kiel translima cigeradoĵetado, organizas manifestaciojn, instalis tempo-bankon, ofertas riparkafejojn, aranĝas koncertojn kaj postlasas siajn spurojn, jen pordaŭre jen provizore por poste reveni en alia loko.



Guido Brandenburg

Die Grenze markieren Denkmäler und Kunstinstallationen, die auftauchen und verschwinden. Deshalb ist sie keine feste Linie.

Zieht man die anarchisch veralbernde Decke von diesem Projekt, erkennt man seine ernsthafte Absicht. Eine Staatsgrenze ist eine willkürlich gezogene Linie, der es nicht gelingen soll, benachbarte Menschen zu trennen. Gegen unermüdlich gepflegte Stereotypen und Vorurteile wirken nur eigene und gemeinsame Erfahrungen.

Die Nowa-Amerikaner kochen füreinander bei gegenseitigen Besuchen (Motto „Guten Appetit – Smacznego“), veranstalten Olympische Spiele mit Sportarten wie dem grenzüberschreitenden Zigaretten-Weitwurf, organisieren Umzüge, haben eine Zeit-Bank eingerichtet, bieten Repair-Cafés an, arrangieren Konzerte und hinterlassen ihre Spuren, hier für die Dauer - dort vorübergehend, um später an anderer Stelle wiederzukommen.

(trad. Brandenburg)



Fritz kaj Ria 2014 dum ekskurso al Detmold / Fritz und Ria 2014 auf einem Ausflug nach Detmold

Fritz Lautenbach 05.03.1925-12.02.2020

Ĵus atingis nin la informo ke forlasis nin plia konatulo, plia aktivulo, kiu decide helpis rekonstrui la fervojistan Esperanto-asocion en Germanio. Fritz Lautenbach naskiĝis 1925 kaj estis samtempulo de mia patro. Komuna al ili estis la spertoj en la Miljara Regno kaj la personaj konkludoj post la milito. Ilin ligis multjara amika interrilato kaj kunlaboro en la esperantistaj fervojistaj organizaĵoj - foliumante tra raportoj, protokoloj kaj korespondaĵoj ĉiam denove aperis lia nomo. Tiutempe mi mem interesiĝis pri profesiaj aferoj kaj familio pli ol pri Esperanto. Hodiaŭ mi tion bedaŭras, ĉefe ĉar mankas al mi kvazaŭ parto de la esperantista biografio, kiun koni fakte gravus se oni volas priskribi la rolon de la hodiaŭaj geamikoj en retrospektivo.

Fritz estis redaktoro de la Fervoja Esperantisto ĝis 2013, kiam mi transprenis tiun taskon. Mi siatempe vizitis lin en lia domo en Fulda por vidi, kion eblis heredi de li. Kaj mi pasigis tre agrablan tagon fosante tra kartonkestoj, ellogante informojn el la arkaika komputilo, vizitante la kantinon de la financoficejo kaj promenante komune kun Ria tra pitoreskaj stratetoj kaj riĉe ornamitaj salonoj de la urba

Fritz Lautenbach 05.03.1925-12.02.2020

Gerade erreichte uns die Nachricht, dass uns ein weiterer Bekannter, ein weiterer Aktivist verlassen hat, der entscheidend dabei geholfen hat, die Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in Deutschland wiederaufzubauen: Fritz Lautenbach wurde 1925 geboren und war Zeitgenosse meines Vaters. Gemeinsam waren ihnen die Erfahrungen im Tausendjährigen Reich und die persönlichen Schlussfolgerungen nach dem Krieg. Sie verband über viele Jahre eine freundschaftliche Beziehung und Zusammenarbeit in den Organisationen der Eisenbahner-Esperantisten – beim Durchblättern von Berichten, Protokollen und Korrespondenzen tauchte immer wieder sein Name auf. In dieser Zeit interessierte ich selbst mich für berufliche Angelegenheiten und die Familie mehr als für Esperanto. Heute bedaure ich das, weil mir quasi ein Teil der Biografie der Esperantisten fehlt, deren Kenntnis wirklich wichtig wäre, wenn man die Rolle der heutigen Freunde in der Rückschau beschreiben will.

Fritz war Redakteur des Fervoja Esperantisto bis 2013, als ich diese Aufgabe übernahm. Seinerzeit hatte ich ihn in seinem Haus in Fulda besucht, um zu sehen, was ich von ihm erben

kastelo. Ria ne nur estis akompananto kaj vigliganto de Fritz sed ankaŭ sperta ĉiĉerono de sia urbo.

De Fritz tiuokaze mi ricevis tre koncizan kronologian tabelon de liaj aktivecoj. La unua alineo indikas la esperantistiĝon 1951 en kurso ofertata de la fervoja faklernejo Fulda. Sian unuan IFEF-kongreson li ankoraŭ menciis, tiun en Lindaŭ 1952. La sekvintajn li nur sumigis per „kaj multaj pliaj“. Same li procedis rilate la GEFA-renkontiĝojn.

En la alineo „1967“ troviĝas membreco en la loka kongresa komitato de la 19-a IFEF-kongreso en Fulda, ne pli. Konsiderante ke temas pri aranĝo kun 470 partoprenantoj el 20 landoj, abunda faka kaj distra programo, lingvaj ekzamenoj, ekspozicio, stratbapto kaj pli ol 160 gazetartikoloj, mi supozas ke Fritz ankaŭ tie faris meritoplenan laboron.

1974 - mi daŭrigas citadon – Fritz estis nomumata ekzamena komisiito de Germana Esperanto-Instituto kaj gvidis la ekzamenan komisionon de GEFA. Iu aŭ alia certe memoras lin kiel ekzamenanto. En instruadon li plue kaj plie investis energion. En la jaroj 1983 kaj 1984 li kompilis la memlernan kurson de GEFA. Dissendante kaj konsilante Fritz zorgis por vendo kaj apliko de tiu verko de 1984 ĝis 2013. 425 interesitojn li sukcesis proksimigi al la lingvo. Tion atestas lia statistiko.

En la jaro 2001 Fritz sekvis al Dieter Hartig kiel redaktoro de FE, tion kiel jam dirite ĝis 2013. Jen – modesta kia li estis - la lasta indiko en lia tabelo.

Mi persone vidis lin nur kiel unu duonon de la paro Ria kaj Fritz - Fritz havanta siajn kutimojn kaj opinion, Ria kiu lasis lin fari sed estis la entreprenema impulsdonantino – paro kiun mi observis kun admiro kaj iomete da envio.

Post la lasta komuna GEFA-jarkunveno pasis kelkaj jaroj. Ni vidis nin sporade. Restis la estrarkunsidoj ĉe Karin en Fulda kaj restis la imago, ke ŝanĝiĝas nek ni nek la aliaj. Sed la morto de Fritz Lautenbach memorigas nin, ke tempo estas limigita donaco. Komence de Marto li estus fariĝinta 95-jara.

konnte. Ich verbrachte einen sehr angenehmen Tag, wühlte durch Kartons, entlockte Informationen aus einem uralten Computer, besuchte die Kantine des Finanzamts und spazierte gemeinsam mit Ria durch schmucke Sträßchen und reich verzierte Säle des Stadtschlosses. Ria war nicht nur Begleiterin und Beleberin von Fritz, sondern erfahrene Fremdenführerin ihrer Stadt.

Von Fritz bekam ich bei dieser Gelegenheit eine geraffte chronologische Tabelle seiner Aktivitäten. Der erste Absatz weist darauf hin, wie er 1951 über einen Kurs in der Eisenbahnfachschule Fulda zum Esperanto gekommen ist. Seinen ersten IFEF-Kongress hat er noch erwähnt, den 1952 in Lindau. Die folgenden hat er nur noch unter „und viele weitere“ aufsummiert. Genauso ging er bei den GEFA-Jahrestreffen vor.

Im Absatz „1967“ findet sich die Mitgliedschaft im örtlichen Organisationskommitee für den 19. IFEF-Kongress, mehr nicht. Wenn ich berücksichtige, dass es sich um eine Veranstaltung mit 470 Teilnehmern aus 20 Ländern gehandelt hat, einem umfangreichen fachlichen und unterhaltenden Programm, Sprachprüfungen, einer Ausstellung, einer Straßenwidmung und mehr al 160 Zeitungsartikeln, nehme ich an, dass er auch dort eine verdienstvolle Arbeit geleistet hat.

1974 – ich zitiere weiter – wurde Fritz zum Prüfungsbeauftragten des Deutschen Esperanto-Institut für die GEFA ernannt. Der eine oder andere wird sich an ihn als Prüfer erinnern. In die Unterrichtung investierte er weiter und mehr Energie. In den Jahren 1983 und 1984 stellte er den Selbstlernkurs der GEFA zusammen. Mit Versand und Beratung sorgte Fritz von 1984 bis 2013 für den Verkauf und die Anwendung. 425 Interessierte konnte er an die Sprache heranführen.

Im Jahr 2001 folgte Fritz auf Dieter Hartig als Redakteur des FE, das wie schon gesagt bis 2013. Das ist – bescheiden wie er war – der letzte Eintrag in seiner Tabelle.

Ich persönlich habe ihn nur als eine Hälfte des



Paares Ria und Fritz gesehen – Fritz, der seine Gewohnheiten und seine Meinung hatte, Ria, die ihn machen ließ, aber die unternehmungslustige Impulsgeberin war – ein Paar, das ich mit Bewunderung und ein wenig Neid beobachtete. Nach dem letzten GEFA-Jahrestreffen vergingen ein paar Jahre. Wir sahen uns gelegentlich. Es blieben die Vorstandssitzungen bei Karin in Fulda und es blieb die Vorstellung, dass weder wir noch die anderen sich verändern. Aber der Tod von Fritz Lautenbach erinnert uns daran, dass Zeit ein begrenztes Geschenk ist. Anfang März wäre er 95 Jahre alt geworden.

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**

Mia penso

Sur la kampo for de l'mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l'espero
kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante.
Mia vundo refrapita
min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas, ho sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
el la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
povas esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
post somera promenado!

Mia penso kaj turmento
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kiun havis mi plej karon
la junecon mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne
Vivi ankaŭ mi deziras.
Io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras.
Se ne plaĉos al la sorto
mia peno kaj laboro,
venu tuj al mi la morto,
en espero – sen doloro.

Ludoviko Lazaro Zamenhof

Meine Gedanken

Auf dem Lande, vor dem Städtchen
sommerabends in der Runde,
von der Hoffnung singt das Mädchen,
und es klingt aus ihrem Munde
wie aus fernen Kindertagen
und sie singt so traur'ge Lieder.
So als wär' sie aufgeschlagen,
blutet meine Wunde wieder.

„Warum bist du so verschwiegen,
lieber Freund?" hör ich sie fragen.
„Ist's Erinn'rung?" Sollt' ich lügen?
Ach, ich kann es ihr nicht sagen.
Weinen müsst' ich, wenn ich's sagte,
wozu sollt' ich sie betrüben?
Und was nützt' es, wenn ich klagte?
Wär' ich doch nur fern geblieben!

All mein Denken und die Fülle
meines Hoffens, meiner Schmerzen -
wieviel in der Kammer Stille
opfert' ich von ganzem Herzen!
Ach, das Teuerste im Leben
gab ich hin, es war mein Sehnen,
meine Jugend, all mein Streben,
weil ich's musste – unter Tränen!

Feuer fühl' ich in mir brennen,
etwas treibt mich immer weiter.
Und doch möchte ich leben können,
wie die andern, froh und heiter.
Wenn Erfolg mir nicht beschieden,
dann möcht' ich nicht weiter leiden,
möcht' nicht bleiben mehr hienieden,
hoffnungsvoll von hinnen scheiden.

(trad. Manfred Retzlaff)

Alvoko KER-ekzamenoj

Okaze de kongresoj kaj fine de intensaj kurosj ofte estas ofertataj KER-ekzamenoj, ekzamenoj laŭ la reguloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER). Ĉu ili okazas, dependas unuavice de la nombro de interesuloj. Same la afero aspektas en Frankfurt (Odro) kaj Słubice. Eblaj estas ekzamenoj je tri niveloj: **baza**, **meza** kaj **supera**. Tiuj niveloj konformas al la priskriboj de la Komuna Eŭropa Referenckadro je **B1**, **B2** kaj **C1**. Por okazigo de respektiva ekzameno necesas nombro de 5-10 kandidatoj. Aktuale ni registris unu sinanoncon por ekzameno je nivelo C1. Se vi estas interesita, scivola kaj kuraĝa, strebanta pri konfirmo de via lingva sperteco, tiam ne nur aliĝu al la fervojista Transponta Kongreso 29-a de Majo ĝis 5-a de Junio 2020, sed samtempe anoncu vian ekzamendeziron kaj la elektitan nivelon.



Aufruf GER-Prüfungen

Aus Anlass von Kongressen und zum Ende von Intensivkursen werden oft GER-Prüfungen angeboten, Prüfungen nach den Regeln des Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmen für Sprachen (GER). Ob sie stattfinden, hängt in erster Linie von der Zahl der Interessierten ab. Genauso sieht die Sache in Frankfurt Oder und Słubice aus. Möglich sind Prüfungen auf drei Niveaus: **einfach**, **mittel** und **höher**. Diese Niveaus entsprechen den Beschreibungen des Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmens für Sprachen nach **B1**, **B2** und **C1**. Für die Veranstaltung der jeweiligen Prüfung ist die Anzahl von 5-10 Kandidaten erforderlich. Gegenwärtig haben wir eine Meldung für das Niveau C1 registriert. Wenn du interessiert bist, neugierig und mutig, bemüht um die Bestätigung deiner sprachlichen Erfahrung, dann Melde dich nicht nur zum Brückenkongress der Eisenbahner vom 29. Mai bis zum 05. Juni 2020 an, sondern gib auch deinen Prüfungswunsch und das gewählte Niveau an.

Im Netz: https://www.esperanto.de/de/enhavo/aliĝilo-ifk-2020
oder per Post: BSW-Ortsstelle Werk Kassel, Freizeitgruppe Esperanto, Frasenweg 20-36, DE-34128 Kassel

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**

Redaktofino por FE 01/2020 estos la 15.05.2020		Redaktionschluss für FE 01/2020 ist 15.05.2020	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Fakso:	02508-984511	Fax:	02508-984511
Retpošto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA	Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12